



# OOMOTO

## INTERNACIA

Monata organo de la UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO

Telefono : PASSY 45-87  
KLEBER 08-00

Sidejo : 124, rue de la Pompe, PARIS (16°)

Telegrafa adreso :  
EUROPOMOTO-PARIS

La trezoro, kiun  
homoj ricevas de la  
Ĉielo, estas multe  
pli valora ol oro  
aŭ arĝento.

ONISABRO DEGUĈI.

Jarabono por ĉiuj landoj : 3 sv. fr.

Ĉefredaktoro : K. NIŠIMURA

Helpredaktoro : H. OTAKA  
Generala Sekretario : V. M. ŠIŠKOV

☆ Poŝtmandatoj devas esti sendataj al la persona nomo de la ĉefredaktoro. ☆

## Kosma Misio de Oomoto kaj la Ascendo de la Nova Epoko

La teruraj ventegoj de l' kosma printempo furiozas tra la mondo. La malnovo renversigas ; sanktaj dogmoj kaj kultoj estas forballataj. Mortas epoko senanima... *Mortas la Dio de agonianta tempo.* Denove la sfinka fizionomio de l' mondo ŝanĝiĝas...

En la ascendo de *Nova Tempo* ni staras, — en uragano de malcerteco kaj disireco, de skismo kaj malakordo, de eksciteco kaj disharmonio. Sed ĉiuj, kiuj kun maldermaj koroj aŭskultas la sonon kaj rimovon de l' nova kosma epoko, ĝojas aparteni al tempo, *kiam en ĉiam kreskanta aro da homoj la Dia Fajrero ekflamiĝos!*

La nuna tempo entenas levigojn kaj pereon. Mortas la fantomregno de l' « best-homo » (la « korp-super-animismo »), sed samtempe supreniras la lumregno de l' « Di-homo » (la « animo-super-korpismo »), kiu ne toleras malpurajn agon kaj penson. — La *nuna homo*, kiu preskaŭ tute perdis la rilaton kaj tangentecon kun la naturo kaj kun la kosmo, cedos al la *Nova homo*, kiu konsciigos pri sia interna unueco kun la kosmo. La *nuna homo* estas senlibera, nesavita, — katenita Dio. La venonta epoko donos al li la liberecon kaj savon ! La plejmultaj el ni ĝin travivos. Ĉar la nova kosma « Aquarius » — Epoko venas kun paŝoj rapidaj.

Ĉiu, kiu jam silente aŭskultis la « voĉon internan », sentas la ascendon de la Novo, la vekigon de potenca Mondmovado spirita kaj religia ; li sentas, ke ankaŭ en la fundo de l' propra interno la « Nova Homo » ekleviĝas. Kaj li gaje ekkonas, ke *jam nun* milionoj da koroj atendas la matenkrepuskon de *Nova Spirito*, de « *Novspirito* », kies kosma misio estas, transigi la homaron el la nuna agonianta tempo al la venonta *Ora Epoko*.

Tio estas la *kosma misio de Oomoto kaj Novspirito* : helpi, ke la homoj ĉiam pli vigle evoluu kaj kreskigu la Dian Kernon en sia anima centro, kaj liberigi la spiritajn fortojn de siaj koroj.

La *kosma celo de Oomoto* estas, vekii en ĉiu homa frato la ĝis nun dormintan spiritan


Estimata Samidean(in)o,  
Ĉu vi sendis vian abonkoton por  
**Oomoto Internacia?**

Ni bezonas vian helpon.  
**FARIĜU**  
abonanto de nia ĵurnalo kaj vi ricevos tuj  
**10 belajn Oomoto-ilustritajn poŝtkartojn.**

Jarabono por ĉiuj landoj : 3 sv. fr.

Jarabono kun Membrokarto : 4 sv. fr.

Sendu abonkoton al **S-ro K. NIŠIMURA,**  
**124, rue de la Pompe, Paris 16°.**



Desegnaĵo de Majstro Onisabro Deguĉi.

kaj korreligian internan vivon. Tio estas la kosma signifo kaj graveco de *Oomoto*, ke ĝi helpas nin, trovi en ni mem la « *Nekonatan Dion* », — ne la homsimilan Dion de la sektoj, sed la vivantan *Di-Spiriton en nia koro* kaj samtempe la *neimageblan Absolutan*

*Dion de l' senfina universo!* — Nur tiuj, kiuj jam ekspertis la feliĉigan antaŭsenton de sia Unuigo kun tiu ĉi Dio, estas vere *liberaj*.

Oomoto kaj Novspirito estas la respondoj el la profundo de l' kosmo al la korsopirado de milionoj da homoj, kiujn ne plu kontentigas la malnovaj konfesioj kaj kredoj. Tiu ĉi *kosma misio de Oomoto* fariĝos ĉiam pli evidenta. Kaj ĉiam pli klare Oomoto montras la vojojn al kosma kaj interhomara harmonio. Jam nun Oomoto kaj Novspirito sur ĉiuj kontinentoj komencis plenumi sian kosman mision — sub la plej diversaj formoj : en la Eŭropa « *Neugeist* »-Movado, en la Japana « *Oomoto* », en la Ĉina « *Tao Yuan* », en la koreana « *Huten-ĵjo* », en la amerika « *New Thought* » kaj « *Unity* », « *Blanca Fratara* » de la Balkanlandoj, kaj en similaj novspiritaj movadoj en Afriko kaj Aŭstralio, Sudameriko kaj Hindujo. Kiel granda spirita ondego Oomoto kuras tra la mondo, — naskita el la ardaĵ deziroj de Milionoj.

Jam nun multaj spertis la brilajn lumvibradojn de *nova kosma ritmo*. Ili ekkonis, ke en niaj koroj estas abismoj tiel profundaj, ke oni ne scias la finon. El tiuj kor-abismoj eksonegas la Nova Ritmo, ekleviĝas la *Nova Homo* — en ĉiu el ni!

Tiu ĉi *Nova Homo* ne klopodos provi la *hom-similecon de Dio*, sed demonstracios la *Di-similecon de l' homo*. Li spertos Dion en sia propra interno, kaj pere de l' *Interna Dio* suprenleviĝos al la *Absoluta Dio*. Li sin ekkonos kiel unikan emanon de *Dio* kaj li konscie sin turnos al la vojo de l' *religio* — tio estos la vera senco de l' vorto « *religio* » — kun la Kosma Prafonto. *Dio votas Diojn*, — kaj la venontaj homoj estos Dioj.

La ĉefaj karakterizaĵoj de la mondbildo de l' Nova Epoko estos : la certa scio pri la interna unueco de l' Universo, respekto antaŭ la granda kosma interkunigo kaj tut-interligiteco, la ekkono de la leĝoj de Kaŭzo kaj Efekto, kaj la konscio de l' ĉiama reveno kaj reinkarnigo de ĉiu vivo... ĝis kiam ĝi eniras la grandan kosman Am-Prafonton.

La mondbildo de la Nova Epoko estos bazita sur *kor-religia* fundamento. Naskiĝos ne novaj konfesioj, sed *nova speco kaj tipo de Di-eksperto* superanta ĉion ĝisnunan. Tiu venonta mondpercepto havos *pluan dimension*, ĉar la nova homo ne plu rigardos la ŝajnon,

la eksteron, la surfacon de la objektoj, sed ekkonos ilian internan naturon kaj esencon. Li ekkonos la multflankan tangentecon inter homo kaj kosmo, kaj li ĉiam pli konscie adaptigos al la grandaj kaj malgrandaj ritmoj en la vivo kaj en la universo, — per tio ĉiam pli feliĉigante kaj regante sian destinton.

Ekleviĝas ĵus en niaj tagoj en la homaro *granda religia ondo*, pioniro kaj profeto de la venonta *Ora Epoko de kosma religio*. «*Dio en ni*» estos la devizo de tiu epoko. Por tiu ĉi tempo la Novspiritaj Oomoto-Movadoj volas taŭgigi kaj maturigi la homaron, — por tiu ĉi tempo, kiam la *Religio de l' Absoluta* suprenleviĝas, kiel religio de fajra universala homamo, de arda mondfrateco, de vera humaneco, de interna libereco, de vivanta Di-homeco kaj Di-realigo, kaj de senfina feliĉeco!

K. O. SCHMIDT.

## Venu, Oomoto!

Oomoto, ho, ondo spirita kaj feliĉiganta, ondo de unueco, homamo kaj harmonio,

Orienta ventego eldia interpaciga fluego, — ankaŭ en okcidento

Milionoj da fratoj atendas reformon de sia vivo — sub gvido de Nova Spirito;

O kuloj sennombraj, arde avidaj, serĉadas la Novan Religiecon, kiu liberigas la homojn kaj la popolojn,

Temokratione de la Di-homoj ili atendas, kaj unuigon de la religioj kaj kredoj — per la Dia fajrero — en ĉiu homa koro!

O rdo revenos sur la teron, se vi, Oomoto, Nova Spirito, neniigos la materialismon kaj religos la homon kun Dio!

K. O. S.

## Bataloj en Dia Mondo

(7) (de Majstro O. DEGUĈI)

### ĈAPITRO XXVI

de la *Rakontoj el la Spirita Mondo*

#### La Malvenko de la Malcaj Dioj

Malgraŭ la ripetita malsukceso, *Takekuma* tamen volis impertinente realigi sian unan celon. Tial li konsultis la sekvantajn malicaĵn spiritojn: *Mago*, *Asinaga*, *Usiŭdo* kaj *Torakuma*. La rezulto de ilia interkonsiliĝo estis, ke ili rezignu je la atako de *Kin-Kacu-Kane-no-Kami* kaj ĉefe koncentru siajn fortojn kontraŭ *Ojasima-Hiko*, kiu loĝas en la Takaamahara (Ĉielregno). Sed malgraŭ tio, *Asinaga* kaj *Torakuma* celis ankaŭ la allogon de *Kin-Kacu-Kane-no-Kami*. *Mago* intencis alproksimiĝi al *Ojasima-Hiko* kaj kaptante konvenan okazon, li intencis pikmortigi lin. La tri konspirantoj kaŝis siajn intencojn reciproke kaj volis efektiviĝi siajn planojn tute individue. *Takekuma* gajnis la aliĝon de *Kumataru*, al kiu la Granda Dio havis altan fidon kaj ankaŭ la sekvantulojn: *Usiŭdo*, *Tomohiko*, *Kurohime*, *Kikuhime*, kiuj subkomandantoj ekkomencis ellabori sian atakon. *Kumahiko* elektis kiel siajn subkomandantajn oficirojn la sekvantajn malicaĵn spiritojn: *Sugijama*, *Nakazaki*, *Teruhime*, *Fujihime*, *Hanataci*, *Cuĉihiko*, *Tanikuma* kaj *Kani-*

## AKVA SPEGULO

ONISABRO DEGUĈI

### Plenluno kaj la Tero

En la tago de plenluno, ĉio de la universo ŝveliĝas. Ĉio entenas pli da akveco kaj estas pli freŝeca ol en aliaj tagoj. La montoj ankaŭ pligrandiĝas proksimume unu futon laŭmezure; tamen, ĉar ĉio ŝvelas, la homaj okuloj ne povas tion rimarki. Arboj hakitaj en tiu tago estas plej facile mordeblaj de insektoj, ekz. de termitoj, ĉar ili estas hakitaj tiam, kiam ili enhavas en si plej multe da akvo.

### Mondo de Miroku

La mondo de *Miroku* (Dia Regado) estas tiu en kiu bonfaranto bonigas kaj malbonfaranto malbonigas. En la ĝisnuna mondo estis eble, ke homoj farantaj eĉ malbonon povis gajni multon aŭ atingi altan situacion, se ili kapablas lerte trompi la publikon. Ankaŭ estis tiuj, kiuj agas bone kaj juste, tamen, estas turmentataj kaj suferantaj ĉiam en mizera stato. Tio povis esti, ĉar la mondo estis metata sub la protekto de diabloj. En la mondo de *Miroku* tia absurdo ne permesigas. Kiuj faros bonon, tiuj ĉiam pli prosperos; kaj ĉiuj malbonaj intencoj estas defunde frakasataj. La mondo de *Miroku* estas tiu de justeco, en kiu neniu malica intenco plenumiĝos.

### Radio kaj Klimato

La klimato de la mondo lastatempe rimarkinde ŝanĝiĝis pro la uzado de radio (senfadena). Multaj Oomoto'anoj prenas la frazon en la Sankta Skribo: «*harmoniiĝi la tutan mondon*» en malvasta senco, eble nur en la limoj de politiko, ekonomio, ktp. Tamen la «*harmoniiĝado*» aŭ «*ekvilibrigado*» de Dio ne estas tia malgrandsenca. Tio ampleksas

ankaŭ klimaton; kaj la radio, kiu nuntempe tre progresis kaj estas ĝenerale praktikata tra la mondo, ludas partan rolon en tiu afero. Radio transportas ankaŭ varmon aŭ malvarmon, kiel ankaŭ sonajn ondojn. La malvarmo de l' malvarma zono kaj varmo de l' varma zono estas interportataj de radio unu por la alia, kaj iom post iom la temperaturo de la mondo ekvilibrigas. Sed tamen tio okazas, kompreneble, laŭgrade: la varma zono ĉiam ankoraŭ restos varma, kaj la malvarma zono malvarma. Nur la gradoj de varmo kaj malvarmo estos plifacilitataj kaj moderigitaj. Ĉe meza zono ne okazos tiel granda ŝanĝo. La frazo en la Sankta Skribo: «*La Nordo fariĝos bona*» aludas pri tiu ĉi cirkonstanco. Ankaŭ en la Oomoto-Preĝo oni legas jenajn vortojn: «*... estu mildaj varmo kaj malvarmo sur la mondo... ktp.*» Tio ĉi ankaŭ koncernas la diritan aferon.

### Spirito kaj Animo

Estas tiuj, kiuj mikse komprenas spiriton (japane: *Rei*) kaj animon (japane: *Seirei*). Tio estas eraro. La spirito estas enhavata en ĉio de la universo. Ekzemple, eĉ tablo, ferpoto aŭ herboj havas spiriton. Kiam la spirito tute eliras el objekto, ĝi ne plu povas teni sian formon. Oni malofte vidas, ke tre malnova ujo, ekzemple, ujo el algilo tute nature disfalas. Tio estas pro tio, ke spirito de tiu aĵo eliĝis for. Mineraloj kaj vegetaĵoj, dum ili tenas en si spiriton, estas uzablaj.

Animo estas spirito de animalo, t. e. vivspirito.

Pereigo de homa animo ankaŭ estas okazebla. Eĉ estas tiuj, kiuj perdas la vivon de sia animo, vivante ankoraŭ en korpo. Oni vidas tion ĉe frenezuloj; ilia propra animo estas pereigita de malbonspirito enirinta de ekstere.

Eterne prosperanta vivo de animo, tio estas la privilegio nur de tiuj, kiuj kredas en Dio kaj estas ĉe Dio.

*kuma*. Al li apartenis ankaŭ *Asinaga-Hiko*, kiu celis ruinigi *Ojasima-Hiko'n*. La subkomandantoj de *Magohiko* estis aliflanke la sekvantuloj: *Tajori*, *Mametora*, *Munenaga*, *Kusaka*, *Tokicu*, *Umeŭaka*, *Jaŝima* kaj *Takajama*. Por gajni la favoron de *Ojasima* kaj lian permeson de eniro en la Drakastelo, ili ŝajnis sin amikaj; tamen, ilia celo estis la okupo de la loko kaj la forpreno perforta de la tuta administrado kaj la potenco de la Drakpalaco. Supraĵe, la tri malicaj generaloj agis laŭ komuna plano por la akiro de la Drakpalaco. Ili kolektis multajn malicaĵn armilojn kaj rekte ekmarŝis por la atako de la Ora Ponto.

Sed la malicaĵ atakantoj estis nur aro de spiritoj, kiuj sin bazis per egoistaj deziroj kaj tial, en la lasta minuto ili ne povis sukces. Sed iom poste *Takekuma* ellaboris pli perfektan planon. *Magohiko* post konsiliĝo kun *Sarutobihiko* kaj *Kocune*, ankaŭ aliĝis al la plano de *Takekuma*. Unue ili pensis, ke estas necese sin gardi kontraŭ la fortaj kontraŭulaj spiritoj. Tial ili forigis *Asinaga'n* al tre malproksima loko, dank' al la helpo de *Usiŭdo* kaj *Magohiko*. Nun per la helpo de granda armeo de malicaĵ spiritoj, ili kaŝis *Tomohiko'n*, *Kurohime'n* kaj *Kikuhime'n* malantaŭ la Monto de Olivarboj, por ke ili atendu favoran momenton por refoja atako. *Magohiko* ricevis la ordonon espionari la agadon de *Asinaga*. *Cuĉihiko*, kiu estis subulo de *Kumahiko*, ekkomprenis la planon de *Magohiko*. Li sendis sekretan informanton al *Asinaga*, por ke li ricevu ĉiujn detalajn informojn pri liaj movoj. La stabĉefo de *Magohiko* estis *Munenaga*. *Magohiko* kun

*Munenaga* forrabis la edzinon de *Mametora*, kiu nomiĝas *Kusaka*. Malica dieto nomita *Tajori* ĉiam akompanis *Magohiko'n*, kaj proponis al li diversajn malicajn planojn. *Tajori* estis la malpliaga frato de *Kusakahime*. Sciigante pri la ago de *Magohiko* la subuloj de *Kumahiko* (*Sugijama*, *Nakazaki*, *Hanataci*, *Cuĉihiko*, *Tanikuma*, *Tokihiko*) ofendiĝis. Ili intencis dronigi *Magohiko'n* en la riveron Jordano. *Umeŭaka*, *Jaŝima* kaj *Takajama* ekmalŝatis la malbonan agadon de *Magohiko* kaj ili ĉion raportis al *Ojasima-Hiko*. Samtempe kaj tute nature ili revenis al la Bona Vojo kaj ili refariĝis fidelaj subuloj de *Ojasima-Hiko* defunde de sia koro.

Tiun ĉi tempon la dio *Ojasima-Hiko* estis transiranta la riveron Jordanon kaj li vojaĝis en la malproksima oriento, celante la kontraŭatakon de siaj malicaj malamikoj. *Kumahiko* kun siaj subuloj *Usiŭdo*, *Tomohiko*, *Kurohime*, *Kikuhime*, *Tanikuma* kaj *Torakuma* sin kaŝis malantaŭ la Monto de Olivarboj, celantaj la ruinigon de *Ojasima-Hiko*. Sed *Ojasima-Hiko* tuj obeigis *Magohiko'n*. Kun la armeo de *Takajama-Hiko*, dio de granda kaj senkompara kuraĝo, revenis al la Drakpalaco kaj tie li sciigis pri la intenco de *Takekuma*, laŭ la raporto de *Sugijama* oni ĉirkaŭatakis de ĉiuj flankoj de la monto de Olivarboj kaj volante ruinigi la malamikojn perĉe de unu sola bato, ili forjetadis bombojn de fajro el la interno de ĉielaj rokspoj (aŭ kirashavaj aviadiloj, noto de la Tradukanto). La soldatoj de *Takekuma* disigiĝis nun, kurante al ĉiuj direktoj.

**Stelo kaj Homo**

Estas interesege afero rigardi al la steloj en nokta ĉielo. Ĉiuj homoj havas sian propran stelon. Tamen, plejparto da steloj de la nuntempaj homoj estas tiel nomataj mallum-steloj, kiuj estas nevideblaj. Eĉ ministroj estas de triklasaj aŭ kvarklasaj steloj. Homo de unuaklasa stelo estas treege malofita, kaj tia homo ne staras super la mondo en la nuna tempo. El inter la figuroj de japana historio, Hidejoŝi Toyotomi (antaŭ 400 jaroj) kaj Takamori Saigo (antaŭ 60 jaroj) estis de unuaklasa stelo. De post ili ne aperis tia figuro en Japanujo.

**Kial "Universala Homama Asocio" ?**

Ofte oni trovas en la tagjurnalaro kaj en la gazetaro de la civilizitaj landoj la ekkonsciigantan ekonon de la neceso de interpopola akordo kaj kuna laborado, ne nur hodiaŭ, sed jam de kelkaj jaroj. Oni ĉiam pli klare ekkonas, ke iom post iom la koroj de la homoj maturiĝas por la instruoj religiaj de Oomoto kaj por la praktikaj metodoj de Novspirito. Eĉ proponojn treege similajn al tiuj de la gvidistoj de Oomoto kaj Novspirito oni trovas en gazetoj, kiuj ĝis nun preskaŭ tute ignoris problemojn sociajn kaj religiajn. Nature ni Oomoto'anoj kaj Novspiritanoj tre ĝojas pri tiu ĉi evoluo!

Citante el la serio de tiuj novaj, sed ĝojigaj faktaj nur unu, mi ripetos ĉi tie interesan proponon, kiun faras la konata aŭstra pedagogo J. C. Barolin en sia germanlingva libro: «*Inspiro kaj geniec*», kiu aperis antaŭ unu jaro en Vieno. En tiu ĉi libro li jene proponas la

fondon de «*Altruista Mondorganizaĵo*»:

«*Humaneco, kristana homamo — tiuj estas vortoj, kiuj deus enpenetri en la orelojn kaj korojn de la riĉuloj, por ke ili ekonomie helpu siajn malriĉajn fraĵojn. Sed kvankam tiuj vortoj jam aŭdiĝadas tra la jarcentoj, ili tamen ne sufiĉis instigi la havulojn,*

*doni eĉ nur plej malgrandan parton de ilia havaĵo al la mizeruloj!*

*La Altruismo kontraŭe postulas de ĉiu homo, do ne sole de la riĉaj, helpemon kaj kunsenton kun la gefratoj, egale, ĉu sur la teritorio ekonomia aŭ sociala, ĉu konfesia, nacia aŭ politika. La Altruismo postulas:*

*Sur soci-ekonomia kampo veran nesuferigon de la homaj gefratoj, prizorgon pri la bonfarto de la kunhomo, ĝis kiam tiu staras sur firma ekonomia fundamento kaj atingas plenan ĝuon de la vivo;*

*Sur konfesia kampo plenan toleremon, kiu ne kalumnias aŭ blasfemas tion, kio por aliaj estas sanktaĵo;*

*Sur nacia kampo eĉ similaj kondiĉoj la saman plenan rajtigitecon por la anoj de ĉiuj popoloj;*

*Sur politika kampo la respekton de ĉiuj aliaj malsimilaj politikaj opinioj kaj kredoj sen iaj insid-ecoj kaj subintencoj.*

*Oni devus fondi mondorganizaĵon, al kiu devus aliĝi ĉiuj, kiuj konsentas kun la ĉi supraj tezoj kaj kiuj intencas ĉie pledi por ili. La porpacaj unuigoj, egale, ĉu naciaj aŭ internaciaj, devus aliĝi al tiu «*Internacia Altruista Organizaĵo*», same kiel ankaŭ la etikaj (kaj spiritalistaj) movadoj, kaj kiel tria sekcio devus aliĝi Ligo de Konfesioj.*

*Desplue oni devus inviti ĉiujn grandajn organizaĵojn, kiuj ne servas al ĉiu industria ŝako, kiuj estas internaciaj kaj aprobas la principojn de la Altruista Organizaĵo, ankaŭ aliĝi al ĝi. Ni opinias ĉefe la pedagogiajn, higienajn kaj filozofiajn fakunuigojn internaciajn.»*

Sed la realigo? Ĉu vere estas necesa fonda de speciala organizaĵo?

Ni amikoj de la «*Universala Homama Asocio*» donu la respondon: *Ne!* Kial ne? Ĉar tiu-ĉi organizaĵo jam ekzistas! Estas la «*Universala Homama Asocio*». Tio, kion ni ĝis nun scias kaj mem travivis rilate al la «*U. H. A.*» kaj rilatante ĝian neceson, nin rajtigas esperi, ke ĝi verigos kaj plenumos la postulojn kaj dezirojn de Barolin kaj de multaj aliaj.

Kaj kion ni mem povos fari, por ankoraŭ pli faciligi kaj plirapidigi la realigon de tiuj ĉi ardaĵ deziroj de milionoj? *Multon!*

1. Ĉiu el ni de nun ĉiutage kaj ĉiuhore vivu tiel, kiel li deziras, ke «*la aliaj*» vivu! Ĉar nia propra ekzemplo kaj konduto ĉiam plej bone konvinkos la aliajn!

2. Ĉiu el ni, laŭ siaj fortoj, penu gajni ĉiam novajn amikojn al *U. H. A.*, *Oomoto kaj Novspirito!* Ĉar ĉie estas serĉuloj, kiuj estos feliĉaj konatiĝi kun instruoj kaj movado, kiu ne nur klarigas la disharmonion en la mondo, sed ankaŭ helpas ĝin forigi!

Do: Varbu kaj kolektu novaj geamikojn por niaj altaj idealoj kaj celoj!

K. O. S.

**MEMBROKARTO de Universala Homama Asocio**

Volante kontentigi dezirojn, kiujn oni esprimis el ĉiuj partoj de la mondo, ni fine preparis kaj eldonis Membrokartojn de Universala Homama Asocio. La alĝiktozo poŝtara estas 4 sv. fr. La aliĝintoj ricevos por tiu ĉi sumo nian monatan organon «*Oomoto Internacia*» kaj membrokarton kaj ankaŭ la premion de 40 belaj Oomoto-illustritaj poŝtkartoj.

Por havigi al vi tiun membrokarton necesas ankoraŭ sciigi al ni viajn nomon kaj antaŭnomon, profesion kaj kompletan adreson.

*Skribu legeble!*

**Oomoto-Familio pligrandiĝas**

Ni tre ĝojas sciigi al nia legantaro, ke naskiĝis la kvara majstrino de Oomoto al la triaj ĝeĉefoj Hidemaru kaj Naohi Deguĉi, la 30-an de Julio 1929. Ŝi estas nomita *Naomi Deguĉi* kaj fartas bonege.

Ni oferas elkoran gratulon al la familio.

Al niaj gesamideanoj S-ro Georgi Donĉev. Oomoto-propagandisto, kaj S-ino Vera G. Donĉeva — Tirnovo, Bulgarujo — naskiĝis filineto baptita *Antoaneta*.

Gratulojn al la gepatroj kaj bonan sanon al ilia filineto.

**ĈAPITRO XXVII**

**Ĝismorta defendo de l' Drakpalaco**

*Takekuma, Magohiko kaj Kumahiko* faris triumviraton (1) por akapari la administran povon en la palaco de l' Drakoj. Kiel jam dirite en la antaŭaj ĉapitroj, ili ne atingis sian celon por sia interna rivaleco kaj manko de kontrolo povo. Ilia armeo disiĝis kaj la soldatoj foriris en ĉiujn direktojn de la mondo. Por la supra kaŭzo la *Takaamahara* ĝuis — almenaŭ por iom da tempo — plenan trankvilecon. Sed nun *Takekuma* ree intencis ataki kaj li ŝanĝis sian atakan planon. Pere de longa kaj celkonscia penado li klopodis akiri la kunhelpon de *Izu-no-Mitama*. Ŝi (*Izu-no-Mitama*) iom trankviligis post la gajnita batalo kaj erare pensis, ke la malicaj spiritoj jam revenis al la Dia vojo kaj reforminte sian koron, ne plu intencas ataki. Vidante tion ĉi, *Takekuma* jam ĝojis en sia koro. Li kunlaboris kun *Kocune-Hime*, kiu estas familiano de *Izu-no-Mitama* (filino). Lia intenco estas ĉiam la sama: la detruo de la Drakpalaco — pere de interna atako per surprizo — kaj la konkero de la regado en la Dia Mondo.

*Takekuma* elpensis ruzan taktikon. Li false akuzis sian edzinon *Kikuhime* kaj sukcesis ekسدzinigi ŝin, por ke li povu eniri la favoron de *Kocune-Hime*, filino de *Izu-no-Mitama*. Sed *Kocune-Hime* siavice estis edzino de *Sarutobi*. Kiam la edzo *Sarutobi*

eksciis, ke *Takekuma* volas gajni lian edzinon, li kolere forigis sian edzinon *Kocune-Hime*. *Takekuma* kaj *Kocune-Hime* ĝojis pro la sukceso de ilia intrigo. Ili vizitis la Drakpalaco kaj diris al *Izu-no-Mitama*, ke — la vere sinceraj kaj senpekaj — *Sarutobi* kaj *Kikuhime* estas geadultuloj.

*Izu-no-Mitama* aŭskultis la vortojn de la mensogaj *Takekuma* kaj *Kocune* kaj konsiderante la esceptajn cirkonstancojn, ŝi permesis la edziĝon de *Takekuma* al *Kocune*.

Aliflanke *Ojasima-Hiko* estis informita de *Kin-Kacu-Kane-no-Kami*, ke komploto pretiĝas kontraŭ la Dia Hierarhio. *Kin-Kacu-Kane-no-Kami* sciis tion el la raporto de *Sarutobi* kaj *Kikuhime*, kiuj turnis sin al ŝi. *Takekuma* ĉefe volis edziniĝi *Kocune-Hime* on tial, ĉar ŝi estas la filino de *Izu-no-Mitama*. Tiamaniere, la malica spirito intencis helpi sian planon por la konkero de la Drakpalaco. *Kocune-Hime* siiflanke ekmalamis sian edzon *Sarutobi* on, kiu estas iom stulta kaj obstina spirito kaj volis edziniĝi al *Takekuma*, kiu estas surface ĝentilkaraktera kaj havas grandan influon inter la malgrandaj dietoj. Edziniĝante al li, *Kocune-Hime* agis en la intereso de sia plano, rabi *Kin-Kacu-Kane-no-Kami* on kaj forigi *Ojasima-Hiko* n.

*Ojasima-Hiko* konis la tutan malician intencon de *Takekuma*. Li iris kune kun *Kin-Kacu-Kane-no-Kami* al *Izu-no-Mitama* kaj ili ambaŭ admonis ŝin kaj postulis, ke ŝi retiru sian permeson de edziĝo, kiu estis maljuste donita al geadultuloj kaj gemensogistoj.

Ili klarigis la aferon racie kaj verece.

Ekscianta pri la deŭvaliĝo de sia intrigo, *Takekuma* kaj *Kocune* multe koleriĝis kaj ili

ekatakis *Ojasima-Hiko* n. Aliflanke *Kocune-Hime* havis la helpon de granda armeo de malicaj dietoj. Ili intencis nun ataki *Kin-Kacu-Kane-no-Kami* on de ĉiuj flankoj en la sama tempo. Kaj tiun ĉi fojon ili preskaŭ sukcesis en sia malica plano.

*Oĝima-Uake* (kiu estas bona dio) deziris amikiĝi ambaŭ partiojn. Li tuj venis al la Drakpalaco kun sia malmultnombra armeo kaj li faris sian plejblon, klopodante. Tamen, li ne sukcesis haltigi la batalon, kiu fariĝis eĉ pli kaj pli intensa.

La stabo de *Takekuma* troviĝis en Edena Ĝardeno; *Kosumi* kaj *Aŝinaga* estis liaj staboficistoj. Nun subite la *Takaamahara* kaj ankaŭ la Drakpalaco kovriĝis per malhelaj nuboj kaj la mondo kronis en mallumon, tiel, ke nenio estis plu distingebla. En unu flanko de la ĉielo miloj da malicaj dietoj kuniĝis por helpi *Takekuma* on. La ĉefaj armeanoj estis: *Omori, Kacu kaj Sigimori*. Nun subite tondrego aŭdiĝas kaj fulmoj kaj pluvoj ekfaladas grandamase. Nord-Orienta vento furiozas kaj ŝajnas ĉion forblovi al la ĉielo. *Izu-no-Mitama* tute surprizita per tiu ĉi furioza atako, timiĝis. Ŝi eliris el la Drakpalaco kun siaj subgeneraloj *Takasugi* kaj *Jasukuma* kaj ili rifugiĝis al la monto Sinaŭ. *Kin-Kacu-Kane-no-Kami* restis hejme kun siaj stabgeneraloj *Oĝima-Uake, Motohiko kaj Takasugi*; ili intencis defendi la Drakpalaco ĝismorte. Tia estis la situacio de *Takaamahara* kaj Drakpalaco, kiuj estis preskaŭ disfalantaj en la manojn de la malamikoj.

(1) «*Triumvirato*» estas nomata en la latina antikveco unuigo de tri viroj por konkri la superan povon en la ŝtato.

## En Niemes, Ĉeĥoslovakujo ĉe nia Filiestro-Propagandisto

Ne nur Oomoto insistas mondfinon. Ni scias, interalie, ke en tiuj aŭ aliaj spiritualistaj rondoj, kiuj lastatempe prosperas kaj influas, aperadas medioj anoncantaj la samon; kaj ili eĉ avertas pri minacantaj eksterordinaraj okazontajoj — katastrofoj. Kaj tia fenomeno neniam alitempe estis pli evidenta ol nun. Ŝajnas vere, ke ĉiukaze, la mondo staras antaŭ iu ajn grava ŝanĝo, kaj spiritoj, kiuj volas tion komuniki al homoj, estas tre urĝantaj.

Estus nun la tempo, kiam oni devus al si renovigi la memoron de Bibliaj profetaĵoj pri la lasta juĝo, kaj serioze konsideri la apokalipsajn de Johano.

Kataklimoj. Kia malbeno tio estas! Nekontraŭstarebla forto de l' granda naturo; kaj ĉu la tero vere finiĝus per tio kaj ĝiaj filoj ekstermiĝus? Sed ne. Tio estus nur tiu sufero, kiu okazas ĉe Novenaskoto; estus nur neevitebla ekzamenado por distingi ŝafaron de kaproj. La demando kuŝas ja en tio: kiamaniere efektiviĝos la promeso de Jesuo Kristo pri lia reveno, kaj kiam « Novan Ĉielon kaj Teron » alportos liaj manoj. Vere la mondo metata en la lastaj tagoj devas esti provsteno ankaŭ por pluraj vidantaj granduloj en la mondo por esti kvalifikitaj, kaj tio devas esti la plej brila scenejo por la definitiva Savonto, kiu ajn li estu...

La 8-an de aŭgusto nia oficejo ricevis leteron de S-ro R. Burkert, nia filiestro-propagandisto en Niemes, Bohemio, per kiu li sciigis, ke spirito venis al lia 18-jara filino, havanta iom deantaŭe eon de medio, kaj avertas per ŝi urĝan aferon, kiu minacas. Tio okazis lundon nokte, la 3-an de aŭgusto.

« Francujo kaj Germanujo parte pereos per naturfortegoj. Homoj de la insuloj, savu vin. Dia juĝo komenciĝas. Mallumaj nuboj kovras la ĉielon, alportantaj morton kaj pereon al la homoj!

Homoj atentu! Venas nokto, minacanta, pereiganta kaj — savanta. Silento —, la oceano moviĝas, naskas novan vivon kaj alportas morton. Homoj atentu!

Tio ĉi estas la tutaj frazoj, kiujn S-ro Burkert mem tradukis Esperanten el la germana lingvo, en kiu la filino skribis.

S-ro Nišimura, direktoro de Eŭropa Oficejo de U. H. A. ordonis al mi iri tien kaj enketi la aferon. Ekveturinte la morgaŭan tagon vespere de Gare de l'Est, mi estis en la malgranda stacidomo de Niemes je la 23-a horo de la 10-a tago, kie S-ro Burkert min akceptis renkonte, kaj kondukis min al sia domo.

En tiu sama vespero, kiam S-ro Burkert, F-ino Ilse, — tiel lia filino nomiĝas, kaj mi sidis ĉirkaŭ tablo en la domo, spirito venis al ŝi kaj esprimis al mi bonvenigon kun kelkaj vortoj aliaj; tamen verŝajne tiu ĉi spirito ne estis tiu, kiu diris la averton.

Laŭ la diro de S-ro Burkert estas jene: la 5-an tagon vespere F-ino Ilse subite eniris en medianan staton kaj diris, ke inter la sankta loko de l'Oriento kaj tiu ĉi domo (de S-ro B.) troviĝas spirita fadeno. En la sekvanta momento ŝi ekvidis la figuron de Sankta Sinjoro Onisabro Duguĉi, kiu faras preĝon. Apenaŭ tiu sceno malaperis en ŝiaj fermantaj okuloj, kiam al ŝi venis iu spirito kaj faris la diritan averton. Kaj la spirito estis tiel urĝa, ke S-ro Burkert devis tiu skribi al ni la aferon. Poste, la 8-an jaŭde denove venis tiu spirito kaj je la demando de S-ro Burkert pri la tempo, li respondis: « En du aŭ tri monatoj ». Ankorau li demandis, dirante: « Ĉu mi devas publikigi vian averton? » Li respondis: « Estas via devo sciigi tion al la homoj; tamen la homoj ne kredos. Kaj se tio okazos, la homoj, kiuj akceptas en si la Lumon, estos apartigitaj sendanĝere ».

Min interesis speciale tiuj lastaj vortoj, ĉar tio estas tre prudenta kaj vera. En la Sankta Skribo de Oomoto oni legas: « Ĉie kaj ĉiam Dio gardas sinceran homon kaj elsavas lin eĉ el minacanta fajrego aŭ akvego en eventualaj eksterordinaraj okazoj. Estu ĉiam trankvila; nur kredu firme en Dio kaj laboru per via plejbono por savi aliajn... »

Ankaŭ: « ... neniu hazarde mortos; neniu erare vivrestos... »

Dum mia kelktaga restado tie, neniam venis al ŝi tiu sama spirito, kio estis iomete bedaŭrinda. Tamen, mi scias per aliaj spertoj, ke vere justa kaj altklasa spirito ne emas tiel ofte veni por babilo, kaj ne volas ekspluati la korpon de medio, sed tio okazas nur en necesa okazo, ĝenerale, por unu fojo. Do, en tiu kompreno, mi eĉ povus diri, ke la spirito veninta al ŝi estus konfidinda.

Mi deziras konigi al la legantoj tiun ĉi okazintan faktan nur en la senco de informo, ĉar mi mem ne kapablas decidjuĝi, ĉu la averto estas vera aŭ ne; kaj nur esprimas niaflanke la konvinkigon, ke tiaj kataklimoj povas okazi en la mondo pli malpli frue. Sed tamen pri la tempo kredeble neniu estus certega krom Dio mem.

La 13-an tagon S-ro Burkert ricevis leteron de sia media amikino, loĝanta en aparta loko, kiel respondon por lia sciigo pri la averto de sia filino. Ŝi ankaŭ ekhavis lastatempe, kiel la letero skribas, la orakolon pri iu grava okazontajo, kiu venos en — septembro... Konstatinte tiun ĉi koincidon, S-ro Burkert ŝajnis iom streĉita.

Poste, li prezentis al mi unu germanan gazeton de spiritualistoj, kies titolo estis, se mi ne eraras, « Antaŭbatalanto ». Li aŭdigis min tradukante en Esp. unu el la artikoloj, en kiu la verkinto raportas: « iu medio spirito rigardis la marfundojn de Pacifika kaj Atlantika oceanoj. Ili troviĝas en neordinaraj statoj: tie kaj ĉi tie la fundo levigas. Verŝajne tio estas la antaŭsigno de granda ŝanĝo en la marfundo ». Kaj la verkinto asertas, ke iu grava tempo staras ne malproksime de ni, kaj en la konkludo eĉ mencias pri la Sinjoro, kiu alvenos al la mondo, kiel ŝtelisto en nokto; tiel li alarmas generalan vekiĝon. Ĉe tiu aŭskultado mi estis devigata revoki al mi en la memoro la frazojn de nia Skribo: « En la mondo okazos nepriskribeblaj aferoj. En la maro levigos tero kaj certaj partoj de la tero malsupreniros kaj fariĝos maro », kiuj estis anoncintaj jam antaŭ 30 jaroj... Kiam mi min retiris el la fantazia imago kaj jetis rigardon trans la fenestro de la domo, la folioj de belegaj blankbetuloj, elstarantaj en la serena Bohema ĉielo de vesperiĝo, ŝanceliĝadis sendese susurante, en plena paco, kvazaŭ ignorantaj la sorton de la mondo. Iu kontrasto frapis al mi la koron. Kiom avide mi vere esperus, ke tia paco daŭros longe! Kaj, se la afero estus ĉial neevitebla, la homaro pli frue kaj pli bone prepariĝu! Kaj Dio, Vi maksimume mal-severigu Vian ekzamenon... Io simila al preĝo premis en mia animo.

Alian tagon mi havis grandan ĝojon ĉeesti en kunsido de spiritualistoj, kiu lokon havis en vilaĝo Kristofsgrund, distanca de Niemes unu horon vagonare. Ni iris triope, S-ro Burkert, F-ino Ilse kaj mi. La kunsido okazis en proksima mont-arbaro — en natura preĝejo, kiun ili tre amas. Foriginte tie ĉi ĝian detalan priskribon, mi simple diros mian impreson de ĝi. Entute la spiritualistaj rondoj estas freŝaj tiom, kiom al ili mankas komplika tradicio kaj eniga ceremonio. La membroj ne nur ŝatas ekzoni pri la fratag movoĵoj, sed ankaŭ eĉ estas favoraj por ilin konigi al aliaj. Ĉe ili estas trovebla nenia religia obstineco aŭ ekskluzivismo. Ili havas tre progreseman koncepton. En tiu tago oni donis okazon al S-ro Burkert paroli pri Oomoto, kaj al mi — saluti. Kaj S-ro Kahler, la gvidanto de la societo kaj redaktoro de « Die Glocke » (sonorilo), mem vendis al siaj societanoj kelkdek ekzemplerojn de germana broŝuro pri Oomoto, kiun S-ro Burkert verkis kaj eldonis. Mi estis akceptata ankaŭ de ĉiu el la kunvenintoj vere varme kaj frate je mia granda plezuro. La spiritoj venintaj al medioj en tiu tago, faris ĉefe moralajn instruojn, kiel ŝajnis, kompreneble, en germana lingvo. Mi adiaŭis la gefratojn antaŭ la 5-a vespere, antaŭ ol la kunsido fermiĝis kaj revenis al Niemes.

Ne estus troajo, mi kredas, se mi ĉi tie informus

la spiritan sciigon pere de F-ino Ilse, koncerne la konstruon de la Domo de Homamo, pri kiu la legantoj jam legis en la lasta numero de nia ĵurnalo.

Tio okazis, — S-ro Burkert rakontas — en la vespero, kiam mi eksciis en la artikolo de S-ro Nišimura la entreprenon de la Domo kaj parolis pri tio al miaj familianoj. Spirito venis al mia filino kaj diris: « Tiu entreprenu sukcesos. Sed ne tuj. » « En kiu urbo la Domo konstruiĝos? » — S-ro Burkert demandis. « Pri tio mi ne volas sciigi nun. Tamen, mi diras, ke ĝi staros en la arbaro sur la deklivo de monteto, videbla de malproksimeco. Ĝi havos iun malfacilaĵon dum la konstruado, sed baldaŭ poste tio estos forigita. Finfine ĝi ellaboriĝos en tre grandioza kaj impona aspekto kaj fariĝos tre sankta loko. Iom post iom domoj konstruiĝos ĉirkaŭ tiu Domego, farante ĝin la centra kerno. Kaj tiel poste fariĝos tie unu granda urbejo. Tio tamen ne estos en tiel proksima estonteco... »

Mi ne rajtas konstati la verecon ankaŭ pri tiu ĉi antaŭdiro, sed ĉiukaze, tio estas kuragiĝa por ni; kaj ankaŭ estas interesa tiu lasta punkto precipe en referenco kun la vortoj de Sinjoro O. Duguĉi, kiujn mi aŭdis antaŭe. Li diris: « En la epoko, kiam la Dia Regado efektiviĝos, ĉiuj urboj formos rondon kaj en ĝia centro estos Dia Domo ». Parolante iom flanke, ĉu la formo de l'estantaj urboj ŝanĝiĝos sen ia detruo, sed tute naturmaniere iom post iom? Tion mi ne povas kredi. Do, ĉu ĉiuj urboj disfalus unu fojon per iuj potencaj kaŭzoj kaj ili rekonstruiĝos tute denove? Tion mi ne volus kredi almenaŭ. La manieron Dio scias.

Jen, ankorau alia novaĵo pri Revena Kristo, kiu sugestas ion al ni. Tio okazis kun 60 jara viro, amiko de S-ro Burkert, kies nomon mi ne memoras, kiam antaŭ du tri monatoj S-ro B. vizitis lin en lia vilaĝo sufiĉe distanca de Niemes. Mi miris, pensante, ĉu Bohemio estas regiono de medioj; ĉar tiu maljunulo estas ankaŭ tia; sed la jenon li diris en ordinaraj konscia stato, — tiel S-ro Burkert rakontis. Tio estas:

« La Nova Kristo venos de trans maro. Li renkontos sur la maro eksterordinarajn okazaĵojn. La tuta mondo unuanime lin rigardos kaj observos. Kaj en tiu monda observado Li alvenos ĉi tien trans la maron, tra la dirita eksterordinarajo. »

Ŝajnas, ke la Revena Kristo venos de iu malproksima lando, se tiu ĉi anonco estus vera, kaj tre supeble de alia kontinento ol Eŭropo.

Kiam mi okaze interparolis kun iu juna germana sinjoro, li diris al mi interalie, ke germana popolo nun sopiras kaj postulas grandan heroon, ekzemple, kiel Sismarck, pli ol nuran sanktulon. Mi pensis, ke li pravus. Ne nur Germanujo, sed la tuta mondo bezonas grandiozan heroon. Kompreneble, mi ne diras tiun heroon en la senco de idolo de militarismo. Ne; sed en la senco de granda Entreprenanto. Nura morala instruado aŭ etika logiko ne savas la mondon; tion la homaro jam vere konstatas. Ĝi volas saviĝi ne nur spirite, sed ankaŭ materie. Necesas entreprenoj politika, socia, ekonomia, ktp. kaj aŭtoritata praktikado de la entreprenoj.

Samtempe unika sanktulo kaj unika heroo, alportanta al la mondo la kompletan instruon moralan kaj mondampleksan entreprenon praktikan, nur tiu estos la granda Savonto en nia tempo... Li ne timos ankaŭ « eligi glavon » por neceso, aŭ en familio, aŭ en la mondo, kiel aldis la unua Kristo. Li venu pli frue por la beno de l'homaro; kaj metu la mondon en vere universalan pacon por eterna tempo.

Niemes estis bela urbeto.

Mia tuta impresio estis bonega.

La 20-an matene mi adiaŭis la treege gastaman familion kaj ekveturis al Parizo, pleningante mian koron per admiro al la granda laboremo de S-ro Propagandisto Burkert, kaj konservante en la fundo de miaj okuloj la simpatian figuron de tiom emociĝaj blank-betuloj.

(La 23-an de Aŭg. 1929, H. OTAKA.)

LA 21<sup>a</sup> UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO (2-11 Aŭgusto 1929) en Budapeŝto, Hungarujo

## La XXI-a Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto

Denove okazis unu el la plej brilaj kaj harmoniaj festenoj de la homaro. Pli ol 1200 personoj el 30 nacioj kunvenis en la *regino de la Danubo*, por goji al la homa interkomprenigo kaj pruvi la ekziston de sentoj supernaciaj kaj interhomaj.

Jam la antaŭpreparoj estis bon signifaj. Okazis ja en arango de la hungara ĉefurbo la unua internacia pedagogia kurso de pastro *Andreo Ĉe*, kiu kunigis el 12 landoj pli ol 150 geinstruistojn, parte tiajn, kiuj ankoraŭ ne sciis la lingvon. La pedagogia instrumentado de Ĉe, bazante sin sur psikoteĥnika, psikoanalitika kaj homama studado, estis inda antaŭludo al la mondkongreso.

La malferma kunsido okazinta en la fama budapeŝta Redut-Palaco revokis denove la atmosferon de la unuaj Esperanto-kongresoj, kiam oni sentis denove dum paroladoj de delegitoj el 30 nacioj, aŭdinte la festepoemon de S-ro *Baghy*, la malferman paroladon de S-ro *Merchant* kaj de aliaj personoj, la neforgesblan animan ĝuon, ke jen kunestas « homoj kun homoj ». Jam la antaŭvespera interkonatiga kunveno en arbareta kafejo estis amika renkontiĝo de malnovaj kaj novaj konatuloj, sed en ĉiu kongreso restas ĉiam la plej impresdona la komuna solena kantado de la himno. Tio estas la momento, kiam la novaj esperantistoj por eterne ligiĝas al nia movado kaj eĉ tiuj, kiuj lernis la lingvon nur pro studemo aŭ amuzado, eksentas ion de la

« interna ideo » kaj farigas ofte ĝiajn plej fidelajn batalantojn.

Jen estis la plej granda signifo de la kongreso. Prave diris S-ro *Merchant* en la ferma kunsido, ke ne la decidoj, sed la fakto, ke oni interkompreniĝas, donas la gravecon al la universalaj kongresoj. Niaj kongresoj estas pli ol laborkunsidoj, eĉ pli ol simplaj homaj amuzfestoj. La granda renkontiĝo de la nacioj, de personoj el plej diversaj fakoj kaj klasoj, estas grandioza manifestacio pri komuna deveno kaj komuna celo de la « homa familio », pledo por la realigo de *homarano*, monro al vojo, kiun irante, oni devas alveni al la samaj idealoj, por kiuj batalas *Oomoto* kaj ĉiuj aliaj ideaj movadoj.

Tiun celon multe helpas la similscencaj paroladoj, la diversaj kunsidoj de eklezioj, bahaistoj, pacifistoj, paneŭropanoj, militkontraŭuloj, k. t. p. kaj la bonsukcesaj belaj diservoj. La amuza programo, ĉu arta, kiel la koncerto montrite la hungaran arton, blindula koncerto, simfonia koncerto, la teatra vespero kaleidoskope doninte scenojn dramatan, burleskan, vilaĝan kaj muzikan, ĉio nur plifortigis la harmonian kunsenton kaj animan kunfandiĝon de la partoprenintoj. La sukcesaj sciencaj prelegoj de la *5-a Somera Universitato*, kiun malfermis eksministro de instruado: D-ro *Georgo Lukács*, ebligis aŭdi diversnacian eminentajn scienculojn pri plej diversaj gravaj temoj kaj donis praktikan bazon al la lingvo, kion kompletigis la dumkongresaj, per Esperanto funkciantaj, poŝto, banko, vendejoj, kasoj kaj ĉiutaga esperanta gazetpaĝo montrante la ĉiutagan flankon de la uzadeblecoj. La skolta trupo servante dum la kongreso, kiel gvardio kaj gvidantaro, kun

esperantaj brakrubandoj kaj flagej montris la signifon de la oficiala servado al fremduloj per Esperanto, kunligante la praktikon kun vera idealismo.

La tuta arango sub la prezido de profesoro *Mihalik* per la helpo de la gefratoj *Tolnai*, D-ro *Lóránd*, S-roj *Kökény*, *Zöldy* kaj *Balkányi* ebligis daŭran ĝuon de la programoj, kiujn bone kompletigis la interesaj promenadoj kaj vizitoj gviditaj de S-roj *Murai*, *Rakusz* kaj *Szász*. La postkongresajn vojaĝojn lerte aranĝis S-roj *Kovács* kaj *Lukács*, al diversaj belaj hungaraj regionoj. Eĉ se la balo, ĉefe aranĝite de S-ino *Kleinberger*, kun naciaj dancoj kaj elekto de « *Fraŭlino Esperanto* » kiun titolon akiris S-ino *Eksta* el Estonujo, ne estis serioza programo, ĝi kun la hungara posttagmeza festo de la « *Pro Patria* » virina ligo aranĝita de S-inoj *Róthey* kaj *Zöldy* montris, ke la esperantistaro satas amuzadi kaj pli povas dankeme ĝui la dancarton. La blindula kongreso — la plej amasa ĝisnun — preparita de D-ro *Bánó*, vizitita inter aliaj ankaŭ de ges-roj *Thillander* pruvis denove la apartan gravan rolon, kiun nia lingvo povas ludi inter la blinduloj. Imponaj estis la standard-inaŭgura soleno de la hungara Esperanto-societo, la komuna marŝo tra la urbo, la inaŭguro de memortabulo por grafo *Széchenyi*, la flornamado de la tomboj de prelo *Giesswein* kaj de la « nekonata heroo ». Kelkaj el la laborkunsidoj, precipe kun paroladoj de S-roj *Stettler*, *Kreuz* k. a. donis pruvon pri serioza organizo de la neŭtrala movado.

Estas neeble menci i la nomojn de tiuj, kiuj el ĉiuj landoj kunhelpis, ke la kongreso estu vera homara kulturifesteno, kiu, allogante la gefilojn de ĉiuj terpartoj, devus atentigi la

homaron pri kreigo de nova kulturo, ebligante sur neŭtrala kaj egala bazo la harmonian homan kunlaboron. Eble iam oni aranĝas la kongreson, pro solvita organizo eĉ sen labor-kunsidoj, kiel semajnan homaran kulturifeston, simile al la Olimpiadaj Ludoj. Kaj la ĉefurboj kaj nacioj avide klopos akiri por si la honoron de la aranĝo. La budapeŝta kongreso pruvis, ke la esperantistaj kongresoj povos esti la plej imponaj kaj belaj tutmondaj kulturaj kaj amuzaj festkunvenoj.

## La Oomoto-Kunveno en Budapeŝto

La homaro vekigas nur malrapide kaj eĉ la esperantistaro ne multe interesigas ankoraŭ pri la pli profundaj ideoj aferoj. Tion pruvis la diversaj fakkunvenoj de la budapeŝta kongreso, inter kiuj la « idealistajn » vizitis ĉiam nur kelkaj dekoj de la kongresanaro. Certe retenis multajn de vizito al la Oomoto-kunveno la neĉesto de S-ro *Nisimura*, kiu pro bedaŭrinda malsano ne povis viziti la nunjaran mondfeston. Inter ĉiuj fakkunvenoj la Oomoto okazis plej unue, sabaton, la 3-an de aŭgusto je 14-a posttagmeze en la filozofia fakultato de la universitato. La tekston de la prelegado, de S-ro *Nisimura*, laŭlegis S-ro *Alfred Klein* el Vieno, poste parolis S-roj *Bruno Braeuer*, *P. Pamporoff*, *Balkányi* kaj aliaj pri la komunaj kaj subtenindaj ideoj de la diversaj similaj movadoj, *Bahaismo*, *Nova Kulturo*, *Nova Spirito*, *Oomoto k. t. p.* alvokante al helpo de la bonintencaj organizoj. Oni disdonis numerojn de *O. Internacia*, kies aŭgustan salutartikolon publikigis hungaringve la budapeŝta ĵurnalo « *Magyarság* » (Hungararo), menciante la fakkunvenon ankaŭ en la ĉiutaga esperantlingva eldono. Multaj budapeŝtaj ĵurnaloj, nesciante pri neĉesto de Oomoto-anoj-japanoj, skribis pri la interesa kunsido de la japanoj pri Oomoto-doktrinoj. (La japanajn esperantistojn reprezentis ĉe la kongreso tri japanaj gesamideanoj).

Oni povis denove konstati, ke nematerialistajn ideojn, precipe japanajn ideojn ne facile akceptas la eŭropanoj kaj oni devos ankoraŭ multon penadi silente kaj pacience, ĝis la koroj kaj mensoj malfermiĝos — en propra intereso — por pli altaj veroj.

Paŭlo BALKÁNYI.

## LA MALLARĜA VOJO

Kristo diras: « Mallarĝa estas la vojo, kaj — larĝa estas la vojo! »

La nuntempaj homoj timas konfesi la Veron. Kaj ju malpli vi parolas pri la Amo, ju malpli vi demandas la homojn pri ĝi, despli forta estas via Amo. Se vi demandas, se vi parolus multe pri via Amo, vi perdus. Ridinde estos, lumigante vespere kandelon, demandi min: ĉu ĝi lumas? Mi diras: ĉu vi ne vidas? Iam, iu veturigis pajlon per sia veturilo, por vendi ĝin. Unu vilaĝano preterpasas kaj lin demandas: kion vi veturigas? — Lignon! — Sed ĉu mi estas blinda, ĉu mi ne vidas la pajlon? — Nu, se vi vidas ĝin, kial vi demandas? Nin ĉiujn okupas jam solvitaj problemoj. Vi vidas la pajlon kaj malgraŭ tio demandas, kion oni veturigas. Vi vidas, ke la homoj ne amas unu la alian kaj vi demandas: ĉu la homoj amas unu la alian? La homoj, kiuj amas, havas ion strangan, ion eksterordinaran skribitan sur sia vizaĝo. Mi ne parolas pri la videbla vizaĝo. Tiu vizaĝo laŭ mi estas masko. Alian vizaĝon posedas la homo — sanktan vizaĝon. Kaj sur ĉi tiu sankta vizaĝo estas skribita io el la sankta libro « *Isavar* ». Ankaŭ sur la sanktaj okuloj de la homo estas skribita io eksterordinara. Ilia rigardo estas sankta. Kiam simila homo, kiu havas Amon, renkontas vin sur la vojo, vi eksentus kvazaŭ la sunradioj de la mateno vin karesas. Ĝi estos

io supera! Antaŭ ĉi tiu rigardo ĉiuj viaj malbonaj impulsoj kaj deziroj malaperas. Estas virinoj, kun simila supera Amo, kiuj, renkontante viron pasian, kun plej malaltaj deziroj, nur ekrigardante lin, ĉio malbona en li falas, degelas, kaj en li vekigas la Disentoj, kaŝitaj profunde en lia animo. De tiu momento ĉi tiu viro diras: de nun mi estos vera viro! Mi ŝanĝos mian vivon. Mi vidis unu virinon, kaj mi jam scias kio estas la Amo! Tiu virino forpasis, nenion ŝi diras al li, sed li revenas hejmen renaskiĝinta: mi renkontis lin, mi renkontis unu virinon, kiu faris al mi tian fortan impreson, ke mi neniam forgesos sin! Ĉu ŝi diris al vi ion? — Ne, nenion ŝi diris, sed mi ne povas ŝin forgesi... Tiu virino tute ne pensis pri li. Ŝi estis nur kondukilo, tra ŝi trapasis la Lumo de la Amo. Ŝi estis fokuso, en kiu devas esti forbruligitaj la pasioj de tiu viro. Ĉiu malĉasta virino, ĉiu malĉasta viro, estas aliaj fokuso, ili estas homoj de la objektoj. La virino volas allogi viron al si, ankaŭ la viro volas allogi virinon al si. Amikoj, partioj, asocioj, — ĉiuj volas allogi la homojn al si por fari el ili objektojn de sia instruo. Tio ne estas Diinstruo! Ĉiu homo devas esti lasita libere evolui laŭ sia naturo. Ĉiu pomo devas esti lasita evolui nature. Ĉiu fonto devas esti lasita sekvi sian naturan direkton. Se ni volas doni al ĝi novan direkton, ĝi difektiĝos. Ofte la homoj diras: ke ni plibonigu ĉi fonton. Kaj ili ŝtariĝas marmoraĵn tabulojn, ĉirkaŭbaras la fonton, sed ĝi perdas sian kuracforon. Pli frue la fonto ne havis tian agrablan aspekton, sed posedis forton en si mem. Kaj nun? — Vi vidas iun — vestita bone, kun moderna ĉapelo, silka kravato, okupas altan postenon, ĉefministro li estas, sed perdas ion. Kion? — La plej sanktan — la Amon! Li estas malkontenta de si mem. Mi demandas: ĉu simila homo, kiu estas malkontenta marŝas la mallarĝan vojon? — Ne, li marŝas la larĝan vojon.

Kristo atentigis tiun mallarĝan vojon al siaj aŭskultantoj. Mi ne diros Kristo, sed mi nomos Lin « la predikanto de Izrael, la predikanto de la Amo »; la tiamaj kaj la nuntempaj kristanoj Lin nomas ankaŭ Majstro; mi ne povas kompreni kiel la nuntempa mondo povas nomi Majstro la homon, kies instruo ne estas aplikita en ilia vivo. Mi ne opinias la nuntempajn kristanojn disĉiploj de Kristo. En tiu rilato Kristo ankaŭ ne estas ilia Majstro. Ĉar, se ili estus liaj disĉiploj, ili devus vivi laŭ la instruo de sia Majstro, kaj se la disĉiploj ne marŝas la vojon de sia Majstro, kia Majstro li estas? Gloro de la patrino estas ŝia filino, sed se la filino ne irus la vojon de sia patrino, la patrino suferus kaj elacetus la pekojn, sin oni krucumus. Hodiaŭ Kristo ankoraŭ suferas sur la kruco. Vi ne pensu, ke li estas libera. Ankaŭ en la nevidebla mondo la aliaj Majstroj riproĉas Kriston, dirante: ĉu vi vidas viajn disĉiplojn tie, malsupre sur la tero? Al apostolo Paŭlo, al apostolo Petro, la samon ili diras: Venos tempo, kiam ankaŭ al vi oni diros: jen viaj disĉiploj malsupre, vidu ilin. Vi pensas, ke vi estas liberaj kaj kiam vi mortos, Kristo vin renkontos supre, ĉirkaŭprenos kaj kisis vin. Ne, nenia kiso, nenia ĉirkaŭprenado. Se vi plenumus la volon de Dio, enirante la alian mondon vin ĉirkaŭus tia Lumo, vi estus tiel ĝojaj kaj feliĉaj, kvazaŭ vi posedus la tutan mondon. Kie ajn vi ekrigardus ĉie vi vidus nur Lumon — nenian alian objekton. Senfinan Lumon vi vidos, ĉie nur Lumon! Ankaŭ nek vin mem, nek la aliajn homojn vi vidos, sed nur Lumon, senfinan Lumon!

Nuntempe, objekto por la homoj estas la materia vivo. Mi ne parolas pri la tera, sed pri la ideo vivo, kiu diferencigas fundamente de la tera vivo, ĉar la homa amo estas amo de la objektoj. Se vi vivus laŭ la homaj kompreno, vi devus havi objekton, sed se vi volus vivi laŭ Dio, vi vivus sen objektoj!

Mi diras: de la vidpunkto de la Diamo, la kriplajoj de la homa amo povas esti korektitaj nur enportante la lumon de la Diamo. Leĝo estas: sen

Dio, amo inter la homoj ne povas ekzisti! Kristo mem diris: « Kie estas du aŭ tri, kunvenintaj en mia nomo, tie estas ankaŭ mi ». Do, kie estas la Amo, aŭ Dio, tie estas ankaŭ mi — tie ne ekzistas objekto, tie la Amo povas esti rivelita. Parolante pri la Amo, oni ĉiam komprenas oferon kaj racian, ententataj en ĝi. Tiuj ĉi du aĵoj estas necesaj por la Amo. La homo, kiu havas en si la superan Dian Amon, estas la plej forta, la plej racia.

« Mallarĝa estas la Vojo » — diras Kristo. Ni supozu, ke vi estas instruisto ie. Se vi amas elkore viajn lernantojn kaj se vi komencus instrui al ili ĉi tiun Dian Veron, ĉu vi pensas, ke oni ne forpelus vin el la lernejo? Se, kiel ŝtato, vi komencus apliki tiun Amon, ĉu vi pensas, ke oni permesus al vi okupi vian postenon? Eĉ pri Tolstoj, kiu estis tia genio, giganto kiel verkisto, depost kiam li kuragiis paroli pri la granda ideo de la Amo, ĉiuj diris, ke lia genio ŝpibris, ke li jam estas maljuniginta kaj stultiĝinta. Do, laŭ la kompreno de la nuntempaj homoj, ĉiuj, kiuj havas objektojn en sia vivo, estas saĝaj homoj, kaj ĉiuj, kiuj ne havas objektojn en sia vivo, estas iom frenezaj, malsaĝaj, stultaj homoj.

Nun ĉiuj demandas: kie estas la vivo? Kie estas la senco de la vivo? — La vivo estas en la mallarĝa vojo; en la mallarĝa vojo estas ĝia senco. El tio sekvas unu leĝo: ni perdas nian vivon, ĉar ni marŝas la larĝan vojon. Kaj ju pli la homoj maljunigas, despli ili perdas la sencan de sia vivo. Ĝis kiam ili estas junaj, la vivo havas sencan por ili — ĉio, kion ili vidas ĉirkaŭe, enportas ĝojon en iliajn animojn. Sed kiam ili maljunigas, nenio jam ilin kontentigas. Tio estas kaŭzita de ĉi tiuj eksteraj objektoj. Kaj ĉar la homo ne konas la veran vivon, li sentas ian internan premon en sia animo, li sentas sin supersatigita de tiuj objektoj. La nuna vivo devas esti transformita kaj la homo devas transiri de unu stato en alian. Tio estas la konscia vivo; ĝin ni eelas. Senutile estas paroli multe al la mondo pri tio, kion ni celas. Tiun transformigon ni devas realigi, por ke ni provu la forton de nia vivo, ĉar ĉiun vivon oni ekkonas laŭ la forto, kiun ĝi entenas. Por ni estas grave vidi, ĉu ni povas profiti la kondiĉojn, en kiuj ni vivas. La pia homo, kiu tiel komprenas la vivon, kiu vivas sen objektoj, ne plu uzos la plugilon, li ne plu bezonos la fabrikojn. En la nuntempa kulturo, la fabrikoj, la fajro, estas necesaj, sed venos tempo, kiam la elektra energio anstataŭigos la fumon kaj la atmosfero ne plu estos plena je fulgoj kiel nun. Laŭ la sama analogio, ĉiuj, kiuj nun aŭskultas min, kaj ĉiuj, kiuj konfesas la instruon de Kristo — kio okupas vian menson? — Vian menson okupas sentilaj, sensecaj aferoj, kiuj havas nenian valoron; vian menson okupas ideoj kaj pensoj, kiuj portas spiritan infekton — tian infekton, ke eĉ la venonta generacio estos infektita. La generacio, kiu nun venas, estos pli malforta kaj kripla ol la nuna, ĉar la ideoj, kiuj estas enmetitaj en ĝi, ne portas vivon en si mem.

Kristo diras: « Mallarĝa estas la vojo! » Tio estas dirita antaŭ 2000 jaroj. Sed, ĉu vi pensas ke nun la vojo plilarĝiĝis? — Ne, hodiaŭ ĝi estas tiel same mallarĝa, kiel tiam. Pro tio, vi devas preferi la kondiĉojn, en kiuj vi trovos tion, kio enportos sencan en vian vivon.

P. DANOV,

(El *Nova Kulturo*.) Majstro de *Blanka Fratara*.

Germanaj Esperantistoj atentu!

JUS APERIS!

Das Reich Gottes auf der Erde  
(La Dia Regno sur la Tero)

Mallonga historio de Oomoto.

Bona propagandilo tersuperanta.

4 bildoj — 32-paĝa — Prezo: 4 k. ĉ. aŭ 50 pf.

HAVEBLA ĉe Rudolf BURKERT (aŭtoro),  
Druckereileiter, NIEMES, Ĉeĥoslovakujo.

Esperantistaj grupoj-vendistoj ricevas 25 % da rabato, mendante almenaŭ 10 ekzemplerojn.

# La Projekto por la Kreo de Eŭropaj Unuigitaj Ŝtatoj

de la Kunsido de la S. D. N.

kiu sin malfermis en Septembro 1929 en Genevo

Excelsior, kiu estas senkontraŭdire la plej moderna de la francaj ĵurnaloj kaj kiu scias resumi ĉiujn demandojn, nun instigas la publikan opinionon, pli bone ol neniu alia ĵurnalo, per sia rimarkinda klaro, per siaj bildoj, skemoj, desegnaĵoj kaj siaj geografiaj kartoj, ĵus elmontris per unu artikolo kaj du kartoj la demandon pri la kreo de Eŭropaj Unuigitaj Ŝtatoj, kiun demandon S-ro Aristide Briand metas antaŭ la Kunsido de la S. D. N.

Dank' al la komplezo de la granda ĉiutaga ilustrita ĵurnalo Excelsior, ni povas reprodukti tie ĉi la artikolon kaj la du kartojn.

La parolado, kiun S-ro Briand faris en Genevo pri sia projekto, rilate al la kreo de Eŭropaj Unuigitaj Ŝtatoj, estas sendube unu el la plej gravaj okazintaĵoj de la Kunsido de la S. D. N. dum tiu ĉi jaro.

Ni donas tie ĉi la resumojn de la oficialaj ideoj de Francujo, Germanujo kaj Italujo—pri tiu ĉi projekto. Pro manko de deklaroj de ŝtatoj de aliaj landoj, ni aldonas la ĉefajn esprimintajn opiniojn de la pli granda parto el la Eŭropaj Ŝtatoj, koncerne tiun aferon.

Niaj kartoj prezentas: karto N° 1, la tri grandajn grupojn de Unuigitaj Ŝtatoj ekzistantajn en la mondo; karto N° 2, la nunan Eŭropon kaj ĝiajn terlimojn de politika kaj ekonomia vidpunkto.

## Francujo

**Projekto.** — Post la subskribo de la akordoj en Locarno: « La Eŭropaj Unuigitaj Ŝtatoj komenciĝas. » (S-ro Briand, 1925.)

Necesu por organizi Eŭropon ne kontraŭ aliaj landoj aŭ grupoj, sed por la pli bona aranĝo de tujaj kondiĉoj por la paco; por meti finon al la anarhia stato, kiu ebligas konfliktojn, ĝis iu ago sufiĉe kunordigita, ne estos veninta organizi la fundamentajn rilatojn inter la popoloj de unu sama kontinento. (S-ro Briand, Ĉambro de Deputitoj, julio 1929.)

**Ideoj.** — Necesas, ke de ekonomia vidpunkto, kiel ankaŭ de politika vidpunkto, Eŭropo sin organizu. Kaj tio estas en la intereso de Unuono mem. (S-ro Briand, Senato, julio 1929.)

**Opinioj.** — Ĝis Anglujo kaj Rusujo ne estos donitaj siajn alĝojn al la projekto de E. U. S., la realigo de tiu ĉi entreprenu estos malfacila. (S-ro Herriot, aŭg. 1929.)

## Germanujo

**Projekto.** — Por doni la necesan facilecon al la monda ekonomio, kiu permesos al ĝi transiri de la epoko de detala komerco al tiu de raciigo, estas necesega monda ekonomia konferenco... Hodiaŭ, la landoj estas dividitaj per doganaj muregoj... Ni esperu, ke la malsameco de la mono kaj de la doganaj tarifoj malaperos. Tio povas esti la verko de granda konferenco, kion la konferenco de Hago permesos, ke ĝi realiĝu. (S-ro Stresemann, Hago, 6 aŭg. 1929.)

**Ideoj.** — Koncerne la akordon de Hago pri la elspezoj por la milita okupigo de la 1-a de sept.:

« Tio estas la unua-manifestiĝo de la E. U. S. » (D-ro Wirth, germana ministro.)


**Opinioj.** — Parto el germana ĵurnalo suspektas, ke la realigo de E. U. S. permesos al Francujo ekzercisian superregecon sur la kontinento.

## Anglujo

La Ministerio de la Eksterlandaj Aferoj ricevis nian komunikon pri tiu demando de la franca registaro. (Deklaro ministra al la Komunumoj, julio 1929.)

**Ideoj kaj opinioj.** — Nek unu sola aŭtoritata voĉo sin levis en Anglujo favore al la aliĝo al la eŭropa ekonomia grupojĝo.

## LA TRI GRANDAJ ŜTATGRUPOJ EN LA MONDO



ĈEFAJ POLITIKAJ KAJ EKONOMIAJ KARAKTERIZAJOJ (RILATIVA UNUECO)

Usono: 7.839.000 kv. km., 120 milionoj da loĝantaro, 48 federaciigitaj ŝtatoj, sen internaj doganaj baroj, granda politika kaj financa forto, granda ekonomia prospero. — Brita Imperio: 63.939.900 kv. km., 450 milionoj da loĝantaro, komunejo de la britaj nacioj, unuigitaj sub protekto de la krono. Laŭpreferaj tarifoj, ekonomia sistemo elvokanta malfacilaĵojn. — Rusujo: 20.875.100 kv. km., 133 milionoj da loĝantaro. Unio de Sovetaj Socialistaj Respublikoj, kapablaj havigi al si petrolon, lignon, lanon, feron, karbon, mineralojn kaj eventuale cerealojn kaj kotonon. Ĝi bezonas eksterajn kreditojn.

## Italujo

**Projekto.** — La registaroj kaj la komercaĵo ĉambroj studas planojn de defendo kontraŭ la protekcionismo de Usono. Unu el ili, proponita de S-ro Briand, ĝuas certan famecon. Li, laŭ la ĵurnalaj informoj, proponis

la eŭropaj popoloj (projekto Briand, kiu devos aliĝi al si Anglujo, meritas esti ekzamenita kun plej granda atento. (Deklaro de S-ro Theunis, prezidanto de la Registaro, prezidanto de la Internacia Komerca Ĉambro.)

## Rusujo

**Opinioj.** — La Paneŭropo, kiel tutaĵo de la eŭropaj kapitalistaj ŝtatoj, laŭ la ideo de S-ro Briand, devas esti kontraŭmetita kontraŭ la Sovieta Unio kaj kontraŭ la « bolŝevika danĝero », t. e. kontraŭ ĉiŝi revolucia mondo movado de la proletaro kaj la subpremitaj popoloj. (« Pravda » de Moskvo, 14 julio 1929.)

## Aŭstrujo

Ni devas esti dankemaj al S-ro Briand pro tiu ĉi propono... Sed la malfido pligrandiĝis, ĉar parto el la pariza ĵurnalaro kaptis tiun okazon por elmontri ankoraŭ unufoje la problemon pri la aliĝo de Aŭstrujo al Germanujo. Neniu eŭropa ŝtato devas imagi al si, ke estus sufiĉe enri en ian kombinacion, eksteran amandan, por sin liberigi de ĉiu zorgo. (Deklaro de S-ro Seipel, malnova kanceliero, julio 1929.)

## Hispanujo

**Projekto.** — La esenca objekto de ekonomia unio de Eŭropo devas esti la komuna adopto de la ekonomiaj kaj industriaj metodoj, kiuj helpis al Usono ĝian grandegan potencon. (« Le Sol », 21 julio 1929.)

**Ideoj.** — Nur eŭropa federacio povas certigi la savon de la kontinento. (« La Vanguardia » de Barcelono, 19 julio 1929.)

**Opinioj.** — Sciinte la timojn, kiujn estigas la ekonomia konkordo kaj la forigo de la doganaj baroj, oni devas unue ekkoni la projekton antaŭ ol sin prononci. (« Le Debate », 19 julio 1929.)

## PEGIGITA EŬROPO KAJ NEFEDERACIGITA DEPOST 1919



FRONTIĜOJ POLITIKAJ KAJ EKONOMIAJ UNUECOJ

10 milionoj da kv. km., 450 milionoj da loĝantaro. Politika dispeciĝo pli granda kaj doganaj baroj pli longaj kaj pli grandaj ol en 1914. Tri grandaj rasoj superregantaj, konsiderinda nombro da naciecoj, 100 lingvoj, distingblaj moroj, politika kaj ekonomia nacismoj. Kontraŭmetiĝo de la intereso de industriaj kaj agrikulturaj ŝtatoj. Ĉesto de angla kaj rusa grupoj, formantaj jam unuigitajn ŝtatojn kun teritorioj ekster Eŭropo.

## Privataj aŭ Grupaj Opinioj

**Grafo Coudenhove-Kalergi, prezidanto de Paneŭropa Unio:** La ideo pri federacio ne povas sin edifi sur la principo de superregeco, hodiaŭ kadukita. Paneŭropo signifas nek novan rezignon, nek novan devigon, koncerne la paktkontraktojn. Pacaj reekzamenoj finiĝos tiom pli facile, kiom la rilatoj inter la najbaraj popoloj estos pli amikaj. (Deklaro, julio 1929.)

**Federacio de la Komitatoj de la Eŭropa Kooperado (sidejo Stockholm):** Deziro, ke la Eŭropa Federacio sin disvastigu en la kadro de la S. D. N., en kunlaboro de ŝtatoj de aliaj kontinentoj. (Julio 1929.)

Elfrancisĝis el Excelsior

V. M. Siŝkov.

## Belgujo

La ekonomia paco estas la bazo de la politika paco. La ambaŭ estas intime ligitaj... La grupoj de

**Heroldo de Esperanto**

La sendependa internacia organo de la Esperantistaro. La sola gazeto en Esperantujo, kiu estas iel komparebla kun ĉiutagaj naciaj gazetoj.

Aperas ĉiusemajne kun 8-10 grandgazetaj paĝoj, kun interesaj artikoloj kaj multaj ilustraĵoj el la Esperanto-movado kaj la tutmondo.

Petu senpagan specimenon de la Administracio

**HEROLDO DE ESPERANTO - Eöln Germanlando**  
Brüsseler Str. 94

## FILMARTO

Se ni devus kredi la personojn, kiuj venas de Usono, ni povus meti nian malnovan kontinenton en staton de neprogreso. Tiuj personoj rakontas al ni aferojn, kiujn oni ne konas ankoraŭ en Eŭropo. « Ĉiuj filmteatroj, diras ili, prezentas nur parolantajn filmojn. La silenta filmo jam travivis sian epokon. » En Eŭropo ĉiuj filmteatroj, escepte de kelkaj, prezentas ankoraŭ silentajn filmojn. Kaj la kelkaj parolantaj filmoj, kiuj estas efektive prezentataj kiel grandaj esceptoj, ne tro plaĉas al ni, almenaŭ ili ne kontentigas nin. La kaŭzo pro tio estas multaj. Unu el ili rezultiĝas pro la kripoleco, kun kiu oni montras al ni tiujn parolantajn filmojn (usonajn, kompreneble). La filmitajn muzikaĵojn ni aŭdas sufiĉe bone kaj tion ni sukcesos fari dum la prezento de kiu ajn nacia filmo, sed ni havas la bedaŭron konстати, ke ni trovas grandajn malfacilaĵojn kompreni la parolon, ĉar rigardante la filmojn, ni rimarkas, ke la lipoj de la geartistoj moviĝas, sed maloftege ni aŭdas la parolataĵojn, kiuj estas plej-grandparte forigitaj kaj anstataŭitaj per surskriboj. Tiamaniere, nin oni devigas aŭdi nur parolajn fragmentojn, kiuj neniel respondas al la tiom fervora peno de la geartistoj movi siajn lipojn. S-ro Fred Niblo deklaris antaŭ kelkaj monatoj, ke la Eŭropanoj rifuzas esti tiel malĝentile atentataj, se oni prezentas la usonajn parolantajn filmojn kiel silentajn. Al ni restas la ĉagreno nin lamenti, ke ni ne povas kapti la valoron de tiu ĉi deklarita ĝentileco, kiun esprimis tiu fama usona scenmetisto.

La lukto por la lingva superregeco fariĝas nun tiom akra, ke oni timas la fiaskon de la parolanta filmo de internacia vidpunkto.

Por la momento, ni povas nur scivoleme observi la disvolvigon de la lukto, kiun ni iam partoprenos.

V. M. ŜĜKOV.

## Domo de Homamo

Rilate al la 32-a numero de « Oomoto Internacia », kie ni publikigis artikolon « Domo de Homamo », ni informas niajn legantojn, ke ni de nun malfermos rubrikon sub la supra titolo, sub kiu ni publikigos la nomojn de la gesamideanoj, kiuj bonvolus sendi al ni subvenciojn por la konstruo de Domo de Homamo. Tiun numeron ni sendos tuj al vi laŭ demando.

Ni faras alvokon al ĉiunaciaj sinceraj homoj, riĉuloj kaj malriĉuloj, alporti siajn brikojn por la Domo de Homamo. Ĉies opinioj kaj konsiloj, kiujn oni komunikos al ni koncerne la formon de la « Domo », la lokon, kie ĝi devus esti konstruata, estos konsiderataj atentate.

Laŭ la iniciato de Sankta Sinjoro O. Degučić, la Domo de Homamo estos konstruata en la centra parto de Eŭropo. Tion iniciaton aprobis samideanoj el ĉiuj partoj de la mondo.

La Domo de Homamo havos komunan preĝejon, internacian kunvenejon, bibliotekon kun Esperantofako, kompreneble, muzeon, klubon, loĝejon por malpli riĉaj vizitantoj ktp.

Al ĉiu estas jam certa afero, ke la entrepreno estas grandioza, ĉar la domo, kiun ni volas konstrui, similos, laŭ siaj amplekso kaj majesteco, al la nunaj modernaj palacoj.

Ni ĝojas anonci tie ĉi la malavaran donacintojn, kiuj tuj respondis al nia alvoko kaj sendis al ni laŭvolajn sumojn:

Eŭropa Centra Oficejo de U. H. A. fr. fr. 2.000.—  
S-ro Aimé Sandelyon, Lyon, Franc. » 400.—  
S-ro V. M. ŜĜKOV, Paris, Francujo. » 30.—  
S-ro T. Ito, London, Anglujo . . . » 600.—  
S-ro Hideo Otaka, Paris, Francujo. » 50.—  
S-roj J. Kabe, A. Takemoto, Anzai, Okada, Joŝida, M. Suzuki, Nomura, Masuda, Ozaŭa, Kura-baŝaŝi, Fujijama, Mihaŝi, Fujiŝiro, Izumi, Ĉikubuda kaj F-ino Narikaŭa, Jokosuka, Japanujo . . . » 124.—

Entute . . . fr. fr. 2.904.—

Kore dankas

Oomoto Internacia.

## BIBLIOGRAFIO

*Oficiala Jarlibro UEA de la Esperanto Movado 1929.* 480 paĝa. La landoj estas aranĝitaj alfabeto, sed ni dezirus, ke ĉiu paĝo havu je sia supra parto la nomon de la lando, kies delegitojn oni anoncas, por ke la jarlibro estu pli facile konsultebla. Ĝi enhavas la adresaron de 1737 delegitoj el 71 landoj. La landoj, kiuj havas plej multe da delegitoj, estas: Ĉeĥoslovakujo (323), Germanujo (242), Francujo (176), Anglujo (120) kaj Polujo (70).

*BES-Adresaro de esperantistoj el ĉiuj landoj 1929-1930.* Eldono de Bohema Esperanto-Servo, Potŝtejn, Ĉeĥosl. 90 paĝa. La aliĝo al la ĉi adresaro kostas 0,50 sv. fr. La nuna libro enhavas la portretojn de la ĉeĥa filmstelo F-ino Ondraková, konata precipe sub la nomo Anny Ondra, kiu lernas Esperanton. Ĉiu rekonos, ke ŝi estas unu el la plej belaj kaj la plej ĉarmaj esperantistinoj de la Esperanto-movado. Se vi volas gratuli ŝin, sendu al ŝi poŝtkarton, sed neniel atendu respondon, ĉar estus al ŝi neeble respondi. Jen ŝia adreso: F-ino Anny Ondra, Kurfürstendamm 178, Pension Bergfeld, Berlin, Germ. Si ludis en la filmo « Suzy Saxophone », « Anny de Montparnasse », ktp.

*Klasika Legolibro* — de Em. Robert (eldonisto), 5, rue Ravignan, Paris 18, 32 paĝa kaj kostas afrankite 1,50 fr. fr. Plena je multaj komikaj historietoj kaj spritaĵoj, tiu ĉi libreto povas esti agrabla al ĉiu esperantisto.

*La Kongresa Dokumentaro de la 21-a Esperanto-Kongreso en Budapeŝto.* Eble ĝis nun neniu universala Esperanto-kongreso havis tiom multe da dokumentoj, kiel la 21-a. Kongreslibro, plano kaj gvidfolio de Budapeŝto, bank-kaj hotelfolioj, multaj apartaj propagandiloj kaj diversaj reklamfolioj formas la nunjaran kongresdokumentaron. Legu la kongresraporton en la nuna numero (paĝo 5-a)!

*L'Amitié Française* (francilingva), organo de franc-fremdlingda alproksimiĝo. Redaktejo kaj Administrejo: 83, rue d'Amsterdam, Paris 9, Francujo. Jarabono por fremdlingdo 70 fr. fr. Tiu ĉi semajna ĵurnalo pritraktas politikon, literaturon, ekonomion kaj financojn. Preskaŭ en ĉiu numero ni trovas bonajn artikolojn pri Esperanto kaj ni salutas sincere la redaktejojn por la favoro, kiuj ĝi montras al nia lingvo.

*Corriere Della Sera* (itallingva). En sia 196-a numero de la 17-a de aŭg. 1929, ĝi publikigis longan raporton pri la Budapeŝta Kongreso kaj pri la Oomoto-fakkunveno, okazinta dum la sama kongreso.

*Magyarország* (Hungararo). Dum la lasta Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto, tiu ĉi granda hungarlingva ĵurnalo eldonis ĉiutage tujan paĝon en Esperanto. En sia 168-a numero de la 27-a de julio 1929, ĝi publikigis hungarlingve la artikolon « Saluton al la Budapeŝta Kongreso », aperinta en la 32-a (aŭgusta) numero de « Oomoto Internacia ».

*Oomoto*, N-roj 5-6 kaj 7, grandformata, 50 kaj 40 paĝaj kun tre interesa kaj varia enhavo, kaj kun tre belaj bildoj. Ni estis tre surprizitaj pro la bela aranĝo kaj lerta redaktado de la granda monata organo de Oomoto-Movado, sed ni volas ankaŭ rimarki, ke en tiuj du numeroj troviĝas sufiĉe da preseraĵoj, kiuj ja malhelpas nin diri, ke la aranĝo de la gazeto estas perfekta. La eraroj, kiaj ajn ili estu, devas esti severe forigitaj. Pro tio, ni rekomendos pli grandan atenton al niaj fervoraj japanaj samideanoj, kies laboro, cetere, estas senripoza.

*Flandra Esperantisto*, N-ro 2-a, reproduktis la artikolon « La Lingva Evoluado », aperinta en la 31-a numero de « O. I. ».

*Picardie-Esperanto*, N-ro 31-32, reproduktis la pligrandan parton de la rubriko « Filmarto », aperinta en la 32-a numero de « O. I. », kiu temas pri la parolanta filmo.

*D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof, aŭtoro de Esperanto (1859-1917).* Karto kun la portreto de S-ro Zamenhof, desegnita laŭ tre moderna koncepto (kubista). 10 ekz. kostas 1 sv. fr., mendeblaj ĉe la eldonistoj: S-roj R. Dekegel kaj P. P. Collin, Denderstraat, 58, Aalst, Belgujo.

*Udine* (itale kaj esperante). Gvidfolio pri Udine, eldonita de la Udine'a Esperantista Grupo okaze de la 14-a Itala Kongreso de Esperanto, okazinta en tiu ĉi urbo. En 21 paĝoj oni priskribis la historion de la urbo, ĝiajn monumentojn kaj ĉirkaŭaĵojn. La teksto estas akompanata de 5 bildoj. Mendu la broŝureton ĉe S-ro Giovanni della Savia, Via di Mezzo, 18-II, Udine, Italujo.

## ALVOKO

Al ĉiuj Esperantistoj samtempe religiaj (kristanaj) socialistoj, mi faras la urĝan peton konatiĝi sin al mi (plenan nomon kaj adreson! mi petas) por ke ni komune agadu kaj servu la internacian religian (kristan-) socialistan movadon. Ni pruvos tiel agante la utilon de Esperanto kiel interratigilan kaj interkomunikilon por nia movado.

Kun frataj salutoj, Vian samspiritanon,

J. L. BRUIJN,

Daguerrestraat 156, Hago (Nederlandoj)  
Poŝtĉekkonto No 860.

## LETERKESTO

Ni ricevis la abonkiontojn de la jenaj gesamideanoj: F-inoj G. de Waart, Hilversum, Holland (43 fr. fr.); Anton. Brenek, Stein a. D., Aŭstrujo; Anton. Listner, Afrizt, Aŭstr.; S-ino Jans Groenvel, Bergum, Holland; S-roj Ernst Rudolf, Kriesdorf, Ĉeĥosl.; Emil Neubert, Grinna, Germ.; Ljuben Comakov, Dupnica, Bulg.; Dirk Hage, Zuid-Beyerland, Holland; Hideo Sato, Sakuraj, Japan.; Ant. Jandik, Pardubice, Ĉeĥosl.; Willy Weidauer, Zwickau, Germ.; Emil Kolodziej, Krolewska Huta, Pol.; Karl Plona, Krolewska Huta, Pol.; H. Boucon, Anancy, Franc.; John Lester Lewine, New-York-City, Usono.

Al ĉiuj — koran dankon!

Estas necese, ke ni havu pli kaj pli da abonantoj. Ni petas niajn legantojn, ke ili bonvolu senprokraste sendi sian jarabonkionton al ni. La malnovaj abonantoj estas ankaŭ petataj renovigi sian jarabonkionton. La abonkionto estas plej facile sendebla per internacia poŝtmandato, internaciaj respondkuponoj aŭ per naĉla mono, sendita rekomenditeletere.

Simpla jarabono pro ĉiuj landoj: 3 sv. fr. aŭ 15 fr. fr. Jarabono kun membrokarto de U. H. A. pro ĉiuj landoj: 4 sv. fr. aŭ 20 fr. fr. Vidu specialan artikolon!

Al ĉiuj abonanto ni donas premion de 10 belaj Oomoto-ilustritaj poŝtkartoj — bela kolekto de japanaj pejzaĝoj.

Sendu vian abonkionton al S-ro K. Niŝimura, 124, rue de la Pompe, Paris (16<sup>e</sup>).

Omi povas ankaŭ aboni pere de niaj reprezentantoj kaj filistruoj, kies adresojn ni tie ĉi donas:

*Aŭstrujo.* — S-ro Rudolf Gardelko, Mühlbach b/ Bischofshofen, Salzburg;

*Bulgarujo.* — S-ro St. St. Djudjev, Panagjuriste; S-ro Ivan Kirov, Popska 484, Sliven; S-ro Serafim Vitanton, gara Dupnica; S-ro Dočo T. Stanev, abagija, Sevlievo, kaj S-ro Georgi Donĉev, Tirnovo;

*Ĉeĥoslovakujo.* — S-ro F. Mimler, Brükengasse, Trautenau; S-ro Rudolf Burkert, Nimes; S-ro Ant. Kudela, Hor Novosadska, Olomouc, kaj S-ro Matěj Louda, Sokolska 48, Praha II;

*Germanujo.* — S-ro K. O. Schmidt, Brixstr. 8-a, Flensburg; S-ro F. Bachmann, Bahnhofstr. 3/t, Heilbronn; S-ro Ludwig Merkel, Stern-Apotheke, Ahlen i. Westf.; S-ro H. Kuhnert, Arleties Str. 34, Breslau 2, kaj S-ro K. Wunsche, Augustenstr. 17, Leipzig-R;

*Hispanujo.* — S-ro Francisko Miralles, Hellin (Albacete);

*Hungarujo.* — S-ro Paŭlo Balkanyi, Hajos u. 15, Budapest;

*Italujo.* — S-ro Luigi Minnaja, Via Calatafimi 10, Roma 21; S-ro Giulio Matuella, Museo-Stoine Guerre, Rovereto (Trento), kaj S-ro Giovanni della Savia, Via di Mezzo 18/II, Udine;

*Java.* — S-ro Ljem Tjong Hie, Kranggan 19, Semarang;

*Jugoslavujo.* — S-ro Marko Dominis, Sinj, Dalmacio;

*Latvujo.* — S-ro Paskevicius, Ukmerges pl. 53, b. I, Kaunas;

*Polujo.* — S-ro Adolf Oberrotman, Krak Przedm 10, Varsovio;

*Persujo.* — S-ro Mohammed Ruhani, Recht, kaj S-ro Darius Nemesi, Tabriz;

*Svisujo.* — F-ino Irene Molinari, en Muralto (Locarno), kaj S-ro Karl Jost, Stolzesstrasse 7, Zürich;

*Usono.* — S-ro John Lester Lewine, New-York-City, 150 E. 72 nd St.

La Esperantistaro plendas, ke mankas originala Esperanto-literaturo.

## ERARO I

Ĉar pli ol 50 gesamideanoj de

la tuta mondo verkis la libron

## SINJORO LAŬDATA

108-paĝa -- ŝtofkovrila

Esperante kaj japane

Luksa libro je modesta prezo: **NUR 1,50 sv. fr.**

Mendu ĝin ĉe

S-ro K. NIŜIMURA

124, Rue de la Pompe, PARIS-XVI<sup>e</sup>

Le Gérant: HENRI SELVES

Oomoto-Preĝejo Esperantista (V. Polgar), 33, rue Lacépède, Paris, V<sup>e</sup>

